




5*86
>116<

Starto


ORGANO DE
ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



AŬTUNO VENAS...

STAVEBNICE PODVOZKU NÁKLADNÍHO PŘÍVĚSU

AK-2P



Obsahuje tyto díly:

x náprava	596,— Kčs
x oj	126,— Kčs
x podpěra	29,— Kčs
x popisné zařízení	59,— Kčs
x 2 ks třmen (ò A 12,50)	25,— Kčs
x 2 ks blatník vč. zdstěrek (ò 85,—)	170,— Kčs
x nosník K 1000/0	250,— Kčs
x 2 pneu B Beoter 4x8 (ò 105,—)	210,— Kčs
x 2 duše (ò 15,—)	30,— Kčs
x 2 disky 2,45x8" — typ A / (ò 225,—)	450,— Kčs
x 2 hřídele (ò 130,—)	260,— Kčs
	2 584,— Kčs

Technické údaje:

váha (bez korby)	cca 50 kg
celková hmotnost	400 kg
užitečné zatížení	320 kg
max. šířka	1 500 mm
délka	2 500 mm
výška	730 mm

Podvozek nákl. přívěsu AK—2P je bez elektrické instalace (zatím není dodáván panel pro tabulku SPZ vč. svítilen) a bez korby, která je v návrhu pro výrobu.

Na podvozek nákl. přívěsu AK—2P je nutno uvážiti písemnou objednávku. Formuláře objednávek vyžádejte na: INKLEMO VD, 100 00 Praha 10, Třebohostická 3, tel. 78 14 749. Dodací lhůta podvozku (vč. montáže) je závislá na přijatém počtu objednávek. Zákazník bude písemně vyzván k osobnímu odběru.

Montáž podvozku

(s vydáním tech. průkazu)	148,50 Kčs
Celkem cena	2 732,50 Kčs

x úhelníkový rám korby	310,— Kčs
x osová korba	1 300,— Kčs
x 2 x nosníky nos. pro osov. korbu	390,— Kčs

Jednotlivé díly stavěbnice označené x budou samostatně v prodeji výhradně v prodejnách VD INKLEMO — Praha:

Praha 1, Bělehořská 8	telefon: 26 68 24
Praha 2, Bělehradská 128	22 95 31
Praha 4, nám. Hrdinů 5	63 54 65
Praha 7, Dukelských hrdinů 4	87 80 16
Praha 8, Sešelská 170	82 04 81
Praha 8, Sešelská 201	83 14 22

Na tyto díly nabudeme přijímat objednávky, ani nebudou zealónny na dobírku (s výjimkou litrového nosníku K 1000/0).

Výrobek byl hladně testován (vč. podrobného popisu) v časopise SVĚT MOTORŮ z 34/1983.

Inklemo Praha

Tomáš**1972****1906****PUMPR**

Elstara ĉeĥa esperantisto, poeto, tradukisto kaj lingvofakulo D-ro Tomáš Pumpr ĉi-jare estus ĝisvivinta 80 jarojn.

Li naŝkiĝis la 2-an de oktobro 1906 en Dolní Slovénice, studis en České Budějovice, la juristan fakultaton en Prago li finis en 1930. Li esperantistiĝis en 1926, sian Esperantan literaturan verkadon li komencis per kunlaboro al la Ĉeĥoslovaka Antologio /1935/, en 1962 li fariĝis akademiano. Jen koncize la ĉefaj datoj el lia fekunda vivo kaj verkado.

El lia ampleksa verkaro nur parto aperis libroforme: "Bukedo el ĉeĥaj naciaj mitoj" de K.J.Erben /en 1938/, "La bapto de caro Vladimir" de K.Havlíček Borovský /en 1953 kaj denove en 1967/ kaj "Sileziaj kantoj" de Petr Bezruč /en 1971, kunlaboro kun R.Hromada kaj J.Kořínek/. Alia poemego de K.H.Borovský "Reĝo Lavra" estis publikigita en la Nica Literatura Revuo, same lia traduko de "Majo" de K.H.Mácha aperis en diversaj revuoj. D-ro Pumpr verkis ampleksan traktaton "Esperanto sen aspektoj?", kiu aperis en volumo "Simpozio pri ata/ita", redaktita de Kalocsay. Li kunlaboris ankaŭ /kun D-ro Kavka/ ĉe la Esperanta eldono de "Poŝatlaso de la mondo" /1971/ kaj tradukis la propagandan broŝuron "Mallonge pri Ĉeĥoslovakio" /1966/. En manuskripto restis granda vico da tradukoj de poeziaĵoj de ĉeĥaj poetoj.

Post la dua mondmilito D-ro Pumpr kunlaboris kun la esperantlingvaj elsendoj de Ĉeĥoslovaka Radio /"Verda Stacio Praha"/ kaj por ili li havigis vicon da tradukoj, kiel ekz. "Somera firmamento" de Z. Jirotka /1948/, "Gracoplena Jesu-infano ĉe Praha" de Fr. Kožík /1948/, "Fantomo en la kastelo" de M. Sránek /1948/, "Maja fabelo" de V.Mršťík /1950/ k.a. Inter ili elstaris liaj tradukoj de opertekstoj de "Vendita fianĉino" de K.Sabina /muziko de Smetana/, "Najado" de J. Kvapil /muziko de Dvořák/ kaj "En la putro" de K.Sabina /muziko de Blodek/. La operojn elsendis Verda Stacio en plenumo de elstaraj ĉeĥaj operkantistoj, membroj de Nacia Teatro en Praha; la auskultantoj jam antaŭ la elsendo ricevis la opertekstojn en formo de broŝuro, tial ili povis sekvi la operojn dum la elsendo. Por la nacilingva programo de la radiostacio Praha D-ro Pumpr enĉeĥigis la dramon "La mondo ne havas atendejon" de M. Dekker, el la esperantlingva traduko de F.Paulhaber. Sed ankaŭ la Esperantaj tradukoj de D-ro Pumpr servis kiel ponto por alilingvaj tradukoj; ekz. "La bapton de caro Vladimir" tradukis Kei Kurisu en la japanan lingvon, "Bukedon el ĉeĥaj mitoj" tradukis en la ĉinan Li Laojon, sed tiu traduko restis en manuskripto, same kiel la traduko de "Kantoj de Sklavo" de Sv. Ĉeĥ,


Kiujn D-ro Pumpr speciale esperantigis por la enĉinigo.

La rememoron pri D-ro Tomáš Pumpr ni finu per vortoj de K. Kalocsay: "Ekzistas personoj, kiuj, eĉ se ne renkontataj, esats al ni valoregaj jam per tio, ke ili ekzistas, ofte pensataj memoretaj amindaj individuoj, kies bonvola kritiko kaj ĉiama helpopreto estas nepre konfidinda. Tia estis nia Tomáš Pumpr, kaj kiam li, laboranta en sia profesio de juristo ankoraŭ en sia 66-a jaro, mortis en Praha la 10-an de septembro /1972/, mi kaj certe multaj kun mi sentas, ke per tio ni farigis pli malriĉaj, ke la ĉarmo senteble malpliigis en la mondo."
-red-

La ĉeĥa dusezajna gazeto Hádanka a křížovka (Enigma kaj krucvortenigmo - eldonnombro 214 000 ekz.) publikigis en n-ro 16/1986 "ĉenan krucvortenigon" sub la temo Propagace výpočetní techniky (t.e. Propagando de kalkultekniko). La akompana teksto diras: "En Hungario komencis aperadi kvaronjara gazeto Internacia komputado, kiu estas presata en Esperanto kaj okupigas pri kalkultekniko. Oni elektis Esperanton tial, por ke ĝian enhavon helpu kreadi kaj povu ĝin ankaŭ pli facile uzadi malgrandaj kaj evoluaj landoj, kaj ankaŭ landoj lingve izolitaj."

En ĵurnalo Večerní Praha (Vespera Prago) aperis la 15-an de septembro krucvorta enigmo kun jena teksto: "En la Ĝardeno Urbo, Malinová-strato 25 en Praha 10, havas sidejon la Klubo de esperantistoj. Ĝi estis fondita en la jaro 1902 kaj inter ĝiajn fondintojn apartenis ankaŭ poeto S.K. Neumann. La klubo aranĝas ĉiujare kulturajn aranĝojn, kiujn partoprenas ĉirkau ducent membroj. Ili perfektigas tie en la Internacia Lingvo per formo de voĵagpriskribaj kaj prilingvaj prelegoj. Oftaj gastoj tie estas ankaŭ eksterlandaj esperantistoj."
St./Pa.

En la 2-a ĉi-jara n-ro de magazino de la satira revuo Dikobraz (Histriko) aperis poemo de Antonín Pokorný "La Babela Turo". En la poemo du konstrulernantoj Franto kaj Lojzo meditas pri komencitaj kaj nefinitaj konstruaĵoj. Fine Lojzo trankviligas Franton: Mangu, kaj lernu Esperanton!
-te-



ANTONÍN POKORNÝ

BABYLÓNSKÁ VĚŽ

Kdes na stavbě
bůhví na čí
dva zedníčtí
uční svedí
Franta vsedě
Lojza vleže:
Rozestavenost
tý věže
v noci Lojzo
furt mě straší
Pofad ten sen
vo zmatení jazyků
jak postihle
partu zedníků
A strhne se
ječení
až se třese
lezení...
Nebud labut
Klíďto Franto
ježí a uč se
esperanto...



Ilustrace Miloš Kánský

LA REĜLANDO DE HURVÍNEK

Jiří Procházka

/Pasinteco kaj nuntempo de nia pupteatro/

/Fino/

Gravan rolon en la historio de la ĉeĥa puparto okupis la marioneta teatro de Feriaj Komunumoj en Plzeň, kien en 1917 venis Josef Skupa, artisto de ĉiuflanka talento. Post la milito la granda parto de spektakloj konsistis el la kabaredaj programoj por plenkreskuloj, sed en kiuj la tradicia Pulĉinelo ne plu taŭgis. Tiam profesoro Skupa kunlabore kun la ligoŝkulptisto Mosek kreis la marioneton Spejbl, kiu komence rolis sola, sed post kelkaj jaroj, en 1926, aliĝis al li lia filo Hurvínek. Ambaŭ marionetoj akiris baldaŭ grandan popularecon, al kiu kontribuis la neimitebla vorta humuro kaj antaŭ ĉio la aktormajstreco de Skupa, kiu ambaŭ marionetojn parolis, Spejblon ankaŭ kondukis, dum Hurvínek estis kondukata de la edzino de Skupa.

En 1930 Skupa rezignis pri sia profesora funkcio kaj establis propran profesion marionetan teatron, kiu krom regulaj spektakloj en Plzeň veturadis aktori tra la respubliko kaj eĉ eksterlanden.

La plejparto de la amatoraj pupteatroj sekvis tiam celojn edukajn kaj nepolitikajn. Sed aperadis ankaŭ esceptoj, kiem pupoj funkciis kiel instrumento de politika batalo kaj eĉ de rekta agitado. La tragediaj okazaĵoj en 1939 trafis malbonege ankaŭ la amatoran puparton. Dum la okupacio pupteatroj daŭrigis sian agadon kaj prezentis teatraĵojn manifestantajn antaŭ ĉio sentan rilaton al la endanĝerigitaj nacio kaj lingvo. En 1941 la okupaciantoj malpermesis la agadon de Sokol, tial malaperis ankaŭ centoj da Sokolaj pupteatroj kaj tiamaniere la puparto preskaŭ pereis. Restis nur nemultaj grupoj de gantpupoj. Post la liberigo montriĝis, ke dum la milito la pupoj aktoris ankaŭ en koncentrejoj, ekz. en Ravensbrück, kie la ĉeĥaj kaj alinaciaj virinoj preparis je Kristnasko 1944 marionetan spektaklon por infanoj. Ne mallongan tempon aktivis marionetistoj en la Terezina getto.

Dum la unuaj postmilitaj jaroj la puparto evoluis kaj ŝanĝiĝedis, multaj marionetaj teatroj renovigis sian agadon, komenciĝis granda disvolviĝo de gantpupoj. La jaro 1948 iĝis komenco de nova erao ankaŭ por la puparto. Peris la sistemo de sendependaj societoj, tial la pupistaj ensembloj fariĝis membroj de uzinaj sindikataj kluboj kaj de aliaj klerigaj institucioj. Tiuj, kiuj obstine pereistis pri la malnova tradicio, havis komplikajn kaj malfacilan situacion, multaj grupoj neniĝis. La nova liel nomata "teatra leĝo" egalrajtigis la pupteatron kun ceteraj formoj de teatro. Formiĝis profesiaj pupteatroj. Dum antaŭ 1949 ekzistis nur unu sola moderna marioneta teatro - la teatro de Skupa, kiu en 1945 estis renovigita en Prago kiel Teatro de Spejbl kaj Hurvínek kaj kiu ĝis nun konservis

sian esceptan pozicion, - post 1949 estis fondataj pluaj profesiaj pupteatroj. Kiel la unua apeis la Centra Marioneta Teatro en Prago, gvidata de doktoro Jan Malík, poste la pupteatro Rádost /Gojo/ en Brno, kiu formiĝis el altnivela amatora ensemblo estrata de Vladimír Matoušek /kies filo M. rko Matoušek funkcias tie kiel pupaktoro kaj reĝisoro ĝia nun/. Dum sekvaj jaroj fondiĝis pluaj profesiaj pupteatroj en aliaj urboj. Nuntempe aktoras en nia lando 15 profesiaj pupteatroj, el ili 10 el Ĉeĥio kaj kvin en Slovakio. En 1952 estis malfermita katedro de puparto ĉe la teatra fakultato de la Akademio de muzaj Artoj en Prago. Ĝi estis launua puparta altlernejo en la mondo.

Fine la kvindekaj jaroj komenciĝis rimarkinda diferencigo de artaj konceptoj kaj kreaĵ metodoj. Tre plivastiĝis la skalo de esprimaj rimedoj: estas uzataj novaj tipoj de pupoj, sur la scenejo apud pupoj aperas ankaŭ viva aktoro, sen kaj kun maskoj, kiel teknika novaĵo venas "nigra teatro". Sed de tempo al tempo oni revenas ŝate al la tradiciaj marionetoj. La pupteatroj ekskursas eksterlanden kaj disfamigas la bonan nomon de la ĉeĥoslovaka puparto en la mondo. Ek de la Teatro de Spejbl kaj Hurvínek plej ofte prezentas sin eksterlande la Nigra Teatro gvidata de Josef Srnec, sed ankaŭ aliaj pupteatroj vizitas fremdajn landojn.

Post 1949 ŝanĝiĝis la situacio ankaŭ ĉe la amatoraj pupteatroj. Multaj marionetistoj foriris al profesiaj ensembloj, la amatoroj malmultiĝis kaj estas malmultaj ĝis nun. Je la alia flanko sendispute kreskis la kvalito, kion pravas la ĉiujaraj pupartaj revuoj en Chrudim /organizataj ekde 1952/, kie elektitaj amatoraj ensembloj el la Ĉeĥa respubliko prezentas rezultojn de sia laboro. Tre sukcesa estas ekzemple la amatora pupteatro Jitřenka /Aŭroro/ el Brno gvidata de la meritplena pupteatra laborulo František Písek/, kiu preskaŭ ĉiujare prezentas la eminentan ĉeĥan amatoran pupteatron en eksterlando. Ankaŭ la amatoraj teatroj uzas pupon kaj tradiciajn kaj modernajn, inkluzive de teatroj nigra kaj lumineska.

La longa tradicio de la ĉeĥa puparto ekde la tempoj nacerenascaj, la ampleksa amatora pupaktorado, la novtempaj sukcesoj de pupteatroj profesiaj, la fakultata instruado de puparto, la partopreno de ĉeĥoslovakaj fakuloj en la internacia puparta vivo - ĉi ĉio tre grave kontribuas al la multsignifa pozicio de la ĉeĥoslovaka puparto en la mondo, al la famigo de Ĉeĥoslovakio kiel pupteatra grandpotenco kaj klasika lando de marionetoj kaj pupoj ĝenerale.

Estimataj gesamideanoj,
Ĉar mia sanstato ne permesas al mi skribi al ĉiu, kiu gratulis al mi okaze de mia 80-jariĝo aparte, mi eluzas tiun ĉi formon por danki pro amikaj kaj kuraĝigaj vortoj, kiujn mi ricevis de vi per leteroj, telegramoj kaj eĉ per magnetofonaj mesaĝoj. Mi plej kore reciprokas viajn bondezirojn kaj salutas vin amike.

JIRÍ KORIŔEK



scienc-teĥnika sekcio de ĉea

Informo pri la terminologia kurso

Terminologia kurso okazinta ekde la 1-a ĝis la 5-a de septembro 1986 en Roudnice n.L. estis plua grava ŝtupo al pli vasta uzado de Esperanto en sciencaj kaj teĥnikaj tekstoj.

Jam pli ol 80 jarojn ekzistas klopodoj krei fakajn tekstojn kaj evoluigi fakajn lingvaĵojn en Esperanto. Multe da laboro estis farita pere de diversaj unuopuloj, revuoj kaj institucioj. Grava paŝo estis la fondo de Scienca Eldon-Centro /SEC/ en Budapeŝto, post interkonsento de UEA kaj HEA en 1981.

Jam ekde la tempo de Münster oni sentis bezonon de sisteme-meca terminologia laboro. Tial, baldaŭ post la fondo de SEC estiĝis en Budapeŝto ankaŭ Terminologia sekcio de SEC, kunlaboranta kun la Terminologia centro de UEA /Rüdiger Eichholz en Kanado/ kaj Akademio de Esperanto. Fine de 1982 okazis en Bad Saarow /GDR/ seminario pri apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko. En ĉi tiu seminario estis diskutataj bazaj principoj por la terminologia laboro, prezentitaj de Ing. Jan Werner kaj aliaj membroj de Scienca-teĥnika sekcio de ĉea kaj Slovaka Esperanto-Asocioj. Surbaze de ĉi tiu principaro disvolviĝis pli vasta kampanjo, gvidata de Wera Dehler-Blanke. Ĝi rezultis en decido de UEA /1985/ dum la Universala Kongreso en Augsburg, fondi Terminologian Esperanto-Centron /TEC/ plej malfrue dum la jubilea Universala Kongreso en Varsovio en 1987. La terminologia kurso en Roudnice n.L. estis grava ŝtupo al realigo de ĉi tiu decido.

Laŭkvante, la kurso ne estis altnombra. Ĉeestis 30 partoprenantoj el 5 landoj. Inter la ĉeestantoj estis la komisiistino pri preparoj de TEC s-ino Wera Dehler-Blanke. En siaj prelegoj ŝi skizis - inter alie - precipe la du tendencojn en kreado de terminoj, nome la tendencon naturalisman kaj normigan. D-ro Detlev Blanke, elstara interlingvistikisto, plue niaj membroj d-ro Erich Spitz CSC, d-ro Josef Kavka CSC kaj la aŭtoro de la prelegtekstoj Ing. Werner prelegis pri la bazaj elementoj de la lingvo kaj bazaj interlingvistikaj nocioj. Tre gravaj estis la prelegoj de Ing. Werner pri praktika kreado de fakaj terminoj. Li gvidis - bedaŭrinde tempe limititajn - praktikajn ekzercojn, en kiuj rolis preskaŭ ĉiuj kursoj.

La kurson gvidis d-ro Vlastimil Novobilský CSC, prezidento de la scienc-teĥnika sekcio de ĉea, kaj Ing. Zdeněk Pluhař, lingva komisiisto de la sekcio. Inter la ĉeestantoj estis ankaŭ reprezentantoj de la Terminologia sekcio de SEC en Budapeŝto, s-ano Bujdosó Ivan kaj Felső Geza, en Bulgario venis oficiala sendito de la Bulgara Esperanto-Asocio Ing. Boris Marinov,

kaj el Italio la elstara aktivulo en la internacia komputado s-ano Renieri Clerici.

La prelegoj okazis en la sindikata klubo en Roudnice n.L. La estraro de la klubo preparis tre bonajn kondiĉojn por la kurso, disponigis grandan salonon, prizorgis ekskursojn ktp.

Kiel jam menciite, la prelegoj prezentis lingvistikan minimumon kaj principojn de la terminologia laboro. El la prioritaj problemoj indus menciigi precipe la principon de internacieco de terminoj. D-ro Blanke klarigis la ŝanĝon en la nocio "internacieco". La iama "latinida" internacieco ŝanĝiĝis per influo de la germanidaj kaj slavaj lingvoj en "europecan" internaciecon. Konsiderante la influon de la aziaj kaj afrikaj lingvoj nun montriĝas la neceso kompreni la internaciecon kiel "globala". La Latindeco kaj eŭropeco de Esperanto multe forlogas la ekstereŭropanojn.

Rapida kresko de Esperanto en Azio /precipe en Ĉinio kaj Japanio/ kaj en Afriko urĝe postulas malfermi Esperanton al krea partopreno de la ekstereŭropanoj.

El multaj ideoj, kiuj aperis en la diskutoj, oni povas emfazi la jenajn:

- Esperanto ne estas kiel ĉiu alia enta lingvo, ĝi estas lingvo internacia kaj havas aliajn gvid-regulojn.

- La internacieco devas esti globala.

- Oni devas limigi plej eble naturalismajn influojn kaj subteni normigadon laŭ interna karaktero de Esperanto.

Fine de la kurso ĉiuj partoprenantoj alte taksis nivelon de la kurso kaj la lernotekstojn, kaj esprimis la konvinkon, ke ĝi inaŭguras novan etapon en la terminologia laboro.

Oni ankaŭ esprimis la esperon, ke analogia terminologia kurso okazos ankaŭ en aliaj landoj.

/La restantaj prelegtekstoj titolitaj "Terminologia kurso" estas haveblaj en Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská 10, 110 01 Praha 1 por 20 Kčs./

Jiří Laube

Rondeta vivo



La novaj kursoj en PRAHA komenciĝis en oktobro. En kurson por komencantoj aliĝis preskaŭ 50 personoj, tial estis necese dividi la kurson en du partojn; en ambaŭ instruas D-ro Horský. En kurson por progresintoj aliĝis 24 personoj kaj instruas ĝin s-anino Struncová.

Esperanto-Grupo ZNOJMO komencis la kursojn de Esperanto por komencantoj la 4-an de septembro kaj por progresintoj la 5-an de septembro. Ambaŭ gvidas s-ano V. Rotrekl. Entute partoprenas 21 esperantistoj, precipe junaj.

Pri vojaĝo al Japanujo kaj renkontiĝo kun sia korespondanto paroladis s-ano Jaromír Polák. Li preparis ankaŭ ekspozicion de bildkartoj el Japanujo. Kun tre interesa babilado pri Esperanto renkontiĝo en Tokio, Hiroŝima kaj aliaj urboj estis ĉiuj partoprenantoj tre kontentaj.

lingva angulo



Antonín Bombionka

HEROLDO DE ESPERANTO n-ro 7/1982 publikigis la sekvan artikolon: "Kreskanta nombro de objekte jugantaj esperantistoj aprobas la optimale modernigitan Esperanto-ortografion /sen supersigno/, principe laŭ la Zamenhofa reformpropono, ekzemple: angelo, dolca, jaluza, kondicio, stono.... kaj, parte, kun diagrafoj: chambro, ĵhuri, ŝipo k.a.; krome kun la literoj q, w, x, kaj y bezonataj nuntempe en tre multaj sciencaj terminoj internacie uzataj: disleksio /dyslexio, ekvinokso / equinox, ŭato / watt.../ por pli facile atingi oficialan agnoskon kaj generalan instruadon de nia lingvo tutmonde. - Informas: O.E.O., 24 ave Riedisheim, F-68100 Mulhouse. /A-02300/"

Al mi ŝajnas, ke multaj esperantistoj faras ĉion kontraŭ ESPERANTO kaj ĝia movado. Ili certe ne komprenas la IDO-historion! La proponata reformo okulfrape kontraŭas la FUNDAMENTO DE ESPERANTO, laŭ kiu ESPERANTO estas lingvo fonetika, kaj ĉiu litero respondas al unu sono. Tiu principo faras ESPERANTON vere internacia, kaj egale facile lernebla kaj uzebla por ĉiuj popoloj.

Liĝa informilo el Mnichovo Hradiště /prononcu: mnjiĥovo hradjistje/ "VERDA FAMILIO" en la n-ro 12/1980 publikigis artikolon de samideano A.Odehnal.

Li skribis: "Farolante gepatran lingvon, oni neniam pensas pri parolorganoj, ĉar tio estas senkonscia. Ĉe lernado de fremdaj lingvoj la bazo estas presita teksto. ESPERANTO uzas latinajn literojn ĉie, ĉiam la samajn formojn en skribo. Tamen montrigas, ke la sama litero estas terure malsame interpretata, prononcata. Studente ESPERANTON, ni komprenas ĉiun ESFERANTAN literon kun simila aŭ proksimume simila prononco en nia nacia lingvo...."

Precipe novaj esperantistoj devas streĉi sian atenton por kompreni parolon de diversnaciaj esperantistoj, dum la malnovaj alkiutimiĝis al la nacilingvaj strangajoj en ESPERANTO, sekve oni facile divenas la nacion de la parolanto pro nacilingvaj fonetikaj sistemoj.

Laŭ FUNDAMENTO DE ESPERANTO ĉiu simpla sono de la alfabeto de INTERNACIA LINGVO estas esprimata per unu grafika signo, kaj ĉiu signo korespondas al unu sola - ĉiam al la sama - simpla sono /fonemo/. Tial estas nia alfabeto fonetika.

Kio estas "fonemo"? Sono, kiu kapablas diferencigi sencon de vortoj kaj vortformoj. Ekz. en ESPERANTO "b" kaj "v" estas apartaj fonemoj: balo - valo, rabi - ravi. Ankaŭ "u"

kaj "o": roso - ruso, sono - suno, rozo - ruzo.

Ekzistas lingvoj /ekz. hispana, novgreka/, en kiuj "b", "v" kaj "o", "u" estas nur variantoj de la sama fonemo.

Ĉar fonemo diferencigas sencon de vortformoj, nia ĉefa postulo de korekte prononcado en ESPERANTO estu strikta diferencigo de ĉiuj ĝiaj fonemoj.

Ĉiu lingvo havas apartan sistemon. Lernante ESPERANTON ĉiuj estas mincaĵaj de prononceroj: ekz. rusoj mikses "a-o": orango - arango, okcidento - akcidento, komparo - kempa-ro, ofero - afero, postisto - paŝtisto, nocio - nacio; same "e-i": letero - litero; "g-h": halo - galo, hardi - gardi, hasti - gasti. En japana ne ekzistas "l", en la ĉina "r". Oni intermikses: rado - lado, rano - lano, revi - levi. Ankaŭ eŭropanoj faras multajn erorojn en la prononco en ESPERANTO. Ekz. angloj prononcas "r" tro malforte. Oni aŭdas anstataŭ verki - vekti, surda - suĉa, karto - kato, prezo - pezo, ventro - vento. Loloj interŝangas "h-h", moligas silabojn di, ti, ni. Francoj kaj italoj ne elperolas la komencantan "h": horo - oro, haro - aro, homaro - omaro, hajlo - ajlo, have - avo. Germanoj ofte elparolas anstataŭ "s" la "z": roso - rozo, deserto - dezerto kaj preskaŭ al ili ne eblas elparoli literon "j". Bulgaroj kaj latvoj prononcas "l" malmole....

Ĉefaj postuloj de la ĝusta elparolo estas klareco kaj kompreneblo. Parolante ESPERANTON ni devas demandi nin mem: ĉu la sono, frazo, kiun ni uzas, estas sufiĉe klara por ĉiuj esperantistoj? Samideano Henrik Seppik en sia lernolibro "LA TUTA ESPERANTO" skribas: "Honora devo de ĉiuj esperantistoj estas akiri gusten, internacian kaj belsonan elparolon." Severe gardu la unuecan prononcon de nia lingvo!

HEROLDO DE ESPERANTO ankaŭ publikigis oficialan komunikon de la AKADEMIO DE ESPERANTO jam en oktobro 1980: "La AKADEMIO DE ESPERANTO notas kun malaprobe diversajn proponojn ŝanĝi aŭ modifi la ortografion de ESPERANTO. La AKADEMIO konstatas, ke neniuj ortografia ŝanĝo estas necesa aŭ dezirinda, aŭ en ligo kun modernaj presmaŝinoj aŭ komputmaŝinoj, por kiuj ĝia ortografio estas tiel same oportuna kiel la ortografio de aliaj lingvoj, aŭ pro ia ajn alia motivo. La ortografio de ESPERANTO estas integra parto de historio kaj kulturo de tiu lingvo, kaj konformiĝas perfekte al la karaktero de la lingvo. Iu ajn ortografia ŝanĝo nur kompromitus la lingvon kaj ties tradicion. Pro tio la AKADEMIO konfirmas, ke la sola alfabeto de ESPERANTO estas tiu de FUNDAMENTA GRAMATIKO, al kiu aldoniĝas samloke jenaj rimarkoj: "Presejoj, kiuj ne posedas la literojn ĉ, ĝ, ĵ, ŝ, ĥ, ŭ, povas anstataŭ ili uzi ch, gh, hh, jh, sh, u." La komunikado estas subskribita de prezidanto: W. Auld, kaj de sekretario: d-ro A. Goodheir."

Al mi, al ordinara kaj simpla esperantisto plene ŝajnas, ke nia lingvo ne bezonas novajn literojn q, w, x, y kaj, ke ĉiuj esperantistoj devas bateli kontraŭ iuj ajn novaj IDO-tendencoj!

KONVERSACIO por progresintoj



Kvara temo: VOJAĜADO

La plimulto da homoj vojaĝas en vagonaroj aŭ en trajnoj. Trajnoj estas personaj, rapidaj, ekspresaj kaj vartransportaj aŭ ŝarĝaj. Ili konsistas el lokomotivo kaj vagonoj. La lokomotivo enhavas motorojn kaj trenas diversan nombron da vagonoj. Elektraj lokomotivoj bezonas por motoroj trolean cirkvinton, kiu estas konstruita preter la tuta linio sur mastoj. La lokomotivo prenas el ĝi kurenton per simpla troleo aŭ korba pantografo. En motoroj de dizela lokomotivo eksplodas nafto, kiu movas piŝtojn en cilindroj. Elektraj kaj eksplodaj motoroj povas esti eĉ en vagono, en negravaj linioj veturas motortrajnoj. Vapora lokomotivo bezonas karbon kaj akvon, el kiu en kaldrono ekestas vaporo, kiu analogie movas piŝtojn. Por karbo kaj akvo estis post lokomotivo aparta tendro.

Vagonoj veturas per siaj radoj sur metalaj reloj, kiuj estas surfiksitaj sur ŝpaloj en gruzo. La tuto nomiĝas trako. Trakoj havas diferencaj reldistancojn. La vagonoj intertuŝiĝas per bufroj kaj estas kunigitaj per kupliloj. Se la fervojo krucigas ŝoseon, estas tie gardataj barieroj, iam nur averta signalo. Pli sekuraj estas super- kaj subvojoj, do pontoj aŭ tuneloj. En personaj vagonoj estas sidiloj por pasaĝeroj en kupeoj, vagontransportaj vagonoj estas fermitaj, malfermitaj, plataj aŭ specialaj. Pasageroj en- kaj elvagoniĝas en stacioj aŭ haltejoj. Ili eniras aŭ forlasas vagonojn aŭ ŝangas trajnojn. Ili acetas biletojn ĉe giceto aŭ ĉe konduktoro kaj atendas en atendejoj. Se ili povas en stacio tuj eniri alian trajnon, ili havas bonan komunikon. Ili kunportas malgrandajn pakajojn, kofrojn aŭ valizojn. Pli pezajn ili komisias al fervojistoj. Trajnoj veturas laŭ veturhoraro, kiun povas ĉiu aceti en formo de libro aŭ trovi kiuj pendantan afiŝon. Tie oni serĉas bonan komunikon. En ŝangstacioj linioj krucigas, disiĝas aŭ kunigas. Sur trakoj estas relkomutiloj kaj trakforkoj, por ke trajno povu transveturi al alia trako. La plimulto da linioj estas unutraka, do nur en stacioj povas trajnoj preterveturi, alie estus karambolo. La fervojistoj sekurigas per semaforoj kaj aliaj automataj instalaĵoj, ke vagonaroj ne karambolu. Konduktoroj trairas vagonojn, perforas kaj kontrolas biletojn kaj zorgas alie pri pasaĝeroj. En kazo de danĝero povas ĉiu pasaĝero haltigi la trajnon per sevbremso.

La fervojo ne povas supreniri tro krute, tial estas anmontaraj linioj oftaj serpentumoj, iam estas unu relo en me-

zo por dentradoj aŭ por trena kablo, alifoje vagonoj pendas sur kabloj aŭ reloj, kiuj estas sur mastoj. Do estas kablaj pendvojoj aŭ ŝvebaj fervojoj.

Sur ŝoseoj veturas autobusoj aŭ turismaj aŭtoĉaroj, iam sufiĉe longaj, pli frue kun trencaroj. Sur radoj ili havas aertubojn en kaucukaj pneumatikoj. Motoroj estas plej ofte eksplodaj. Veron transportas ŝargautoj aŭ kamionoj, ofte ankaŭ kun trencaroj. Por sablo estas taŭgaj raŭpveturiloj, por kampoj traktoroj, por nego glitveturiloj aŭ sledoj. Sur ŝoseoj veturas multaj personaj autoj aŭ automobiloj de diversaj tipoj. Ŝoforoj tenas direktilradon aŭ stirilon kaj atenteg trafiksigojn ĉe ŝoseo. Sur malseka ŝoseo aŭ glacio la aŭtoj povas jori, nome facile ŝanĝi direkton sen efiko de stirilo. Vico da autoj estas karavano aŭ konvojo. En dezertejoj estas karavanoj de kameloj, en ĉirkaŭpolusaj regionoj karavanoj de sledoj trenataj de hundoj aŭ boĉoj.

Sur akvo navigas diversaj ŝipoj, kiuj havas antaŭe prupon, malantaŭe estas poupo, en la akvo estas kilo kaj en la interno estas ferdeko. Bogtoj estas malgrandaj ŝipoj sen ferdeko. Por sporto ili nomigas kanuoj, kajekoj aŭ kanotoj. Sur riveroj aŭ kanaloj en urboj aperas gondoloj, barkoj kaj jahtoj, kiuj estas plej luksaj. Pramoj anstataŭas pontojn. Ŝipoj ankras en havenoj, iam oni konstruas moleon. Sur la akvo ili movigas per remado de homoj, per blovo de vento, kiu strekas velojn aŭ per motoro. Sur riveroj ili povas nur flosi.

En aero flugas aviadiloj, avianoj, aeroplanoj aŭ flugmaŝinoj. Ili suprenflugas kaj alterigas sur vasta kaj plata flughaveno aŭ aerodromo. Antaŭe estas helicoj, novaj aviadiloj hevas malantaŭe jetojn. Preĉipe raketoj funkcias per jetoj, sed tiuj ne taŭgas ankoraŭ por vojaĝado. Levoforto de motoroj levas pezan aviadilon. Malnovaj aerostatoj eluzis gasojn malpli pezajn ol aero. Ekzistis balonoj kaj eersipoj. Helico de helikopteroj rotacias horizontale, tial ili povas suprenflugi kaj alterigi sur malvasta spaco.

En grandaj urboj kunigas unuopajn kvartalojn, eĉ ĉirkaŭajn domarojn tramvojo, trolebuso, supertera aŭ subtera fervojo aŭ tramo. Plej moderna estas metroo. La trafiko en mallarĝaj stratoj de grandaj urboj estas problemo, kiun solvas semaforoj, komputiloj, moveblaj trotuaroj aŭ stuperoj, oni eksperimentas kun ŝvebiloj. Pro manko de garagoj multaj autoj staras en stratoj kaj estas problemo haltigi automobilon.

Antaŭ la invento de motoro ekzistis luksaj kaleŝoj, malfermitaj faĉtonoj, malpli luksaj kabrioletoj kaj publikaj omnibusoj. Antaŭe estis timono, al kiu oni aljungis plej ofte ĉevalojn. La ĉevalojn direktis koĉero kun vipo kaj direktilsnuro.

Private oni povas aĉeti biciklon, sur kiu oni pedalas per siaj piedoj, motociklon aŭ aŭton, kiujn movas motoroj. Skotero estas motociklo kun ŝirmitaj radoj por ne malpurigi veteranton. Pro sporto oni rajdas sur ĉevaloj aŭ aliaj bestoj, remas en boatoj, glisaĝ sur akvo aŭ en aero kaj ŝelnavigas. Se oni bezonas veturi ciam ajn, oni luprenas droskon, kabrioleton, fiskron, kaleŝon aŭ taksion. Ankaŭ autoj, motorcikloj, bicikloj kaj ŝipoj estas prunteblaj. Sed por stiri kelkajn

veturilojn estas necesa dokumento pri ellerno.

La trafikoj havas multajn regulojn. Ekzemple stiristoj tenas veturilon ĉe unu flanko de soseoj kaj stratoj, ne veturas sur stratoj, kiuj estas malpermeso, sur trotuaroj, respektas piedzonojn kaj ciajn trafiksignojn, alie ili sekvigas karambolojn aŭ pli gravajn averiojn, ili povas nenigi kaj karoserion kaj ĉasion de siaj aŭtoj, sed ĉe mortigi. Por rapida veturado de aŭtoj estas konstruataj larĝaj kaj malmolaj soseoj, nun specialaj autostradoj.

GRAMATIKO: 1. Trovu en la temo kunmetitajn vortojn kaj diru ilin en pli da vortoj: glitveturilo: veturilo glitanta sur neĝo aŭ glacio. 2. Skribu parton de la temo kaj aldonu al ĉiu substantivo taŭgan adjektivan.

STILO: 1. Skribu pri avantaĝoj kaj malavantaĝoj de unuopaj transportiloj. 2. Skribu dialogon pri la evoluo de transporto.

DEMANDOJ: 1. Kiujn transportilojn vi posedas kaj uzas ĉu por sporto, ĉu por laboro aŭ aliaj celoj? 2. Kion oni faras por havigi ŝoforan dokumenton? 3. Kiuj profesioj ekzistas ĉe fervojo? 4. Kio estas transportata per flosado? 5. Kiom da vagonoj havas persona, rapida aŭ vartransporta trajnoj? 6. Kiujn reldistancojn vi konas? 7. Kiel aspektas la ankro kaj kies simbolo ĝi estas? 8. Kion vi scias pri rajdado sur kameleoj?

LUDO: Unu diras substantivon kaj alia devas reagi rapide tiel, ke ĝi diras frazon rilatan al publika transporto /oni povas ĉe limigi: al fervojoj, al ŝipoj ks./ Se oni elektas lerte substantivojn, povas aperi ridindaj frazoj: Ekzemple al vorto ĜIBO la alia reagas: Homo kun granda gibo ne povas en-vagonigi.

Esperanto-grupo ĉe Uzina klubo ROH TESLA Pardubice laboras dum favoraj kondiĉoj. Regulaj estas ĉiujaraj kurso por plenkreskuloj kaj alia por infanoj de la elementa lernejo. Bonan tradicion havas ankaŭ la ekspozicioj antaŭ la aŭtunaj kursoj en la amplekso de 12 m², lokigitaj en la antaŭkamero de la koncertsalonego de la klubo. Ĝin devas trapasi ĉiu partoprenanto de la kulturaj arangoj.

Al la membroj ni konstante akceptas la neceson partopreni diversajn Esperanto-arangojn kaj ĉiujare ni organizas malgrandan karavanvojaĝon al iu internacia renkontigo.

Al la elementa kurso 1985/86 aligis 10 personoj, 8 personoj restis ĝis la fino kaj de ili 5 personoj kun 3 aliaj spertuloj vizitis tre agreblan Esperanto-renkontigon en Potsdam ĉe Berlino. Tie ili faris sian Esperantoekzamenon praktike kaj ĉefe pri parolkapablo!

L. Rýznar



heraldiko

veksilologio

Ĉeĥoslovaka nacia /aŭ pli ĝuste ŝtata/ flago estas kolektiva verko. Ĝenerale ĝi estas priskribata kiel tuko 2:3, dividita en du horizontalaj strioj, blanka super ruĝa; inter ili estas ekde la masto ŝovita blua kojno /triangulo/, atinganta la flagmezon /= centran punkton de la tuko/.

La flago estis inaŭgurita per la leĝo N-ro 252 de Ĉeĥoslovaka Nacia Asembleo 1920-03-30, preskaŭ du jarojn post fino de la 1-a mondmilito. Ĝis tiam estis uzataj t.n. "naciaj koloroj" de Ĉeĥio /Bohemio+Moravio/ - blanka super ruĝa - devenantaj el olda simbolo de la ĉeĥa regno: arĝenta duvosta leono /kun oraj kroneto kaj armaĵo/, portata sur la ruĝa ŝildo. La sama leono estis pli poste uzata kiel la unua blazono

de Ĉeĥoslovaka Respubliko: la jurisdikcio post aliĝo de Slovakio postulis aldoni ties blazonon en la korŝildo sur la bruston de leono: arĝenta patriarka /duobla/ kruco staranta sur blua trimonto, ĉio sur la ruĝa ŝildo. Komune ĝi estis t. n. "malgranda blazono de Ĉeĥoslovakio - kaj kun sesjara prokrastode la II- a mondmilito /okupacio fare de faŝisma Germanio = "protektorato"/ ĝi estis oficiale uzata ĝis la j. 1960. Tiam estis aprobita nova ĉeĥoslovaka - socialisma - konstitucio/la ŝtatnomo estis ŝanĝigita /kompletigita per la vorto "Socialisma"/: ĈEĤOSLOVAKA SOCIALISMA RESPUBLIKO. La konstitucio leĝigis novan ĉeĥoslovakian ŝtatblazonon laŭ projekto de prof. Milan Heger: sur popola /"husana"/ ruĝa ŝildo estas simpligita duvosta arĝenta leono kun ora armaĵo, kronita per ruĝa ore borderita kvinpinta stelo /signo de socialismo/. La leono portas sur la brusto novan blazonon de Slovakio: ruĝa ŝildo kun silueto de monto Kriváň /=tripinta roko/ kaj ora flamo de partizanoj /ĝi memorigas slovakian popolnecian ribelon en 1944/. Samtempe estis transformita ankaŭ standardo de la ŝtatprezidento: anstataŭ tiel nom. "granda blazono" de ĈSR /uzata ĝis 1960/ estis lokita sur la blankan tukon nova blazono de ĈSSR kun pliriĉigita ora tilia branĉaro /por bona grafika eluzo de la kvadratforma flago/. Sed la ŝtatflago restas ĝis nun la sama laŭ leĝo el la j. 1920: la tuko 2:3, dividita en du horizontalaj strioj blanka super ruĝa, inter ili ŝovita blua kojno /triangulo/, atinganta mezon de la tuko. La koloroj estas tradiciaj bohemiaj; la blua kojno simbolas Sllovakion /= slovakajn montojn/.

La aŭtoroj de ĉeĥoslovaka ŝtatflago fakte estas du: iama ŝtatarĥivisto Jaroslav Kurša /1875-1950/ kaj akademiano-artisto Jaroslav Jareš, meritiĝinta artisto /1886-1980/. Ili ambaŭ projektis la flagon sendepende; definitivajn projektojn


de ĉiuj blazonoj kaj flagoj de Ĉeĥoslovakio prilaboris avangarda pentristo prof. František Kysela kun siaj disĉiploj en la Artindustria Lernejo.

Membroj de la Artista Komitato, establita en kadro de ĉeĥoslovaka ministrejo de nacia defendo por projekti ĉiujn ŝtatsimbolojn de Ĉeĥoslovakio /majo 1919/, estis samtempaj ĉeĥoslovakaj elstaraj artistoj, arkitektoj kaj art-teoriistoj: d-ro Bohumil Mathesius, František Kupka/profesor kaj pejzaĝ-pentristo/, Václav Špála /pentristo/, Otakar Španiel /skulptisto kaj ĉeĥa medalisto - interalie projektisto de multaj ĉeĥoslovakaj moneroj, ordenoj kaj medaloj/, Jaroslav Gočár /ĉeĥa arkitekto, pli poste honorigita per titolo Nacia Artist/, František Kysela kaj V.H.Brunner /librografikistoj kaj fondintoj de "nova ĉeĥa grafika skolo"/, d-ro Václav Vojtíšek /ĉeĥa historisto kaj heraldikisto, en 1983 menciita inter la jubileoj de UNESCO/ kaj Jaroslav Jareš.

Lau almetita bildaro de la projektoj videblas, ke ambaŭ aŭtoroj /kurso kaj Jareš/ sendepende venis al preskaŭ samaj konkludoj: Kurso projektis ankaŭ la flagon kun kojno /sed ĝi atingis nur unu trionon, resp. kvaronon de la flaglongo/; Jareš interalie proponis jam nuntempan /en la j. 1920 aprobitan/ formon kun kojno, atinganta flagmezoon. Sed Jareš ankaŭ sensukcese proponadis uzon de la nigra koloro /por memorigi husanan tradicion - vidu signon de "husana pokalo"/. La nigra finfine estis rifuzita - verŝajne pro "tristeco".

Ĉiujn formojn de oficialaj ĉeĥoslovakaj ŝtatsimboloj difinas konstitucia leĝo de ĈSSR N-ro 100/1960, art. 110 el 1960-07-11 kaj rezolucio de la ŝtata registaro N-ro 1005 el 1960-11-14. La formojn de la ŝtatsimboloj konfirmis ankaŭ nova konstitucia leĝo pri ĉeĥoslovaka federacio el 1968. Kvankam lau tiu ĉi leĝo ĈSSR fariĝis federacia ŝtato, konsistanta el du egalrajtaj ŝtatoj - Ĉeĥa Socialisma respubliko kaj Slovaka socialisma Respubliko - ĝis nun ne estis leĝigitaj la ŝtatsimboloj por la unuopaj partoj /kiel ekzemple en Sovetunio/; sur la tuta teritorio de ĈSSR estas uzata sole la flago lau leĝo el 1920.


Jaroslav Klement
/lau bulteno Vexilologie, 1982/



Jen estas kelkaj el la projektoj de la ĉeĥoslovaka ŝtata flago:

projektoj de Jaroslav Kurso

projektoj de Jaroslav Jareš



KORESPONDI DEZIROJ ANONCOJ

La Esperanto-Rondo KD Pardubice serĉas esperantaĵojn, ĉefe librojn au broŝurojn pri kaj de la fondinto S.Schulhof, egalvaloro garantiata. Ne lasu nin longe atendi, ni antaŭdankas. Esperanto pri KD ROH Dukla, Pardubice, Ĉeĥoslovakio

26-jara polino deziras korespondi tutmonde pri vojaĝoj, literaturo, historio, interŝanĝas Esperantaĵojn, bk., PM. Elzbieta Kosik, uĤ. J.Kra-sickiego 3, 22-500 HRUBIESZOW, Pollando

24-jara instruistino interesiĝas pri turismo, muziko, geografio, folkloro kaj kutimoj. Hanna Markiewicz, uĤ. Żeromskiego 65 m 7, 41-800 ZABRZE Pollando

15-jara lernantino volus korespondi kun geamikoj pri ĉiuj temoj, precipe pri rock-muziko, libroj; ŝi kolektas poŝtmarkojn, bildkartojn, kalendarojn kaj plakatojn de rock-kanzonistoj. Adriana Królikowska, uĤ. Dembowskiego 7/27, 38-500 SANOK, Pollando

15-jara Janna Romanova, deziras korespondi tutmonde pri muziko, literaturo, sporto. Adreso: 663 305, USSR, u. NO/RILSK, str. Talnaĥskaja 17-380

18-jara hungara lernanto interesiĝas pri markoj, muziko, libroj kaj korespondado. Antal TURZÓ, Felsabadulás ut. 70, H-6792 ZSOMBÓ, Hungario

Mi estas 80-jara esp-isto kaj ŝatus korespondi kun amikoj. Antonín Pernica, Pension, Polní ul. č. 5, VYSKOV, Ĉeĥoslovakio

35-jara ekonomikisto laboranta en vojaĝoficejo deziras korespondi i.a. pri E-movado, socialaj aferoj, vivmaniero, religio, bonfarado, moroj kaj kutimoj, historio, turismo, vojaĝoj, sporto ktp. Ryszard Djakow, Pl. Woj. Polskiego 7/67, 41-902 BYTOM, Pollando

19,5-jara studento de medicino interesiĝas pri literaturo, teatro, turismo, biologio, geografio, fotografaĵo, filmo, muziko, jaĥtingo. Li parolas germane. Jarek Wyrozębski, Urocza 1-29, PL-1-400 KĘPŹYŃ Pollando

27-jara laboristo interesiĝas pri turismo, geografio, fotografaĵo kaj sporto, kolektas bildkartojn kaj poŝtmarkojn. Andrzej Butkiewicz, Jasionowo 16-411 SZYPLISZKI, Pollando

14-jara Olesja Juĉkova deziras korespondi tutmonde pri muziko, literaturo, kolektas bk. Adreso 663 305, USSR, u. NORILSK, str. Talnaĥskaja 21-49.

Korespondi deziras Samarkanda Esperanto klubo de interpopola Amikeco, SU-703 000, SAMARKAND, Glavpoŝtamt, abon. ja. 76, Uzbekistan, USSR

58-jara franco, mekanikisto alĝustigisto, sekretario de la uzino, kie li laboras, li ŝatas literaturon, romanojn, poeziojn, historion, la sindikatan vivon kaj la politikon, sed ankaŭ la filosofion. Li volus korespondi kun kamarado, sindikato en aĝo 40 gis 70 jaroj. Etienne Lorin, 27 rue Louis Gandin, 44470 ST. LUCE sur Loire, Francio.

Juna hispano, kiu lernas Esperanton, interesiĝas pri filatelio kaj volas korespondi kun ĉeĥoslovaka esp-isto kaj filatelisto. Abelard Rodriguez i Llácer, Verge de Carme, 31, 46290 ALCÁSSER/Valencia Hispanujo

Deziras interŝanĝi bildkartojn, poŝtmarkojn, revuojn aŭ simple interparoli pri la E-movado kaj la lernado de Esperanto kaj aliaj temoj: Gustavo C. Morales, Dardel No. 209 e/c Cobos y Barrutia Reparto, DÉCHE-GUANABACOA 11, Cuba

Prelego pri zoobestoj el Leipzig kaj Berlino. Por la forpermesajulo en 1987 jam nun mi planas kune kun mia edzino kaj filino prelegan vojaĝon ĉe ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj. Mi prelegos helpe de multaj diapozitivaj, afiŝoj kaj poŝtakartoj pri la zoobestoj el la du plej grandaj zoologiaj ĝardenoj en GDR. Interesigantojn mi aldone informos pri mia miljara urbo Altenburg, kiu situas proksime de Leipzig kaj pri nia

gastama Esperanto-klubo MALNOVKASTELO. Kluboj, familioj kaj "aliaj rondoj", kiuj pro sciolo emas inviti min kun miaj damoj, skribu por pliaj informoj al: Hans Georg Kaiser, 7400 ALTENBURG, Wenzelstr., 12, DDR

Sendube vi havas en viaj bretoj kelkajn librojn esperantajn, kiujn vi jam legis, ne plu utiligos kaj perdas pro tia kaŭzo pluan efikon. Donacu al ni tiujn librojn, ni donos al ili utilon per pruntedono al niaj ĝelernantoj. Tio kostos al vi malmulte, vi havos pli da spaco en via hejmo kaj per tio vi helpos la disvastigon de Esperanto. Sendu al ni eĉ nur unu kaj ni elkore dankos vin. Argentina Esperanto-lernejo, Cassilla de Correo 278, 2000 ROSARIO, Argentino

Laŭ gazetanoncon de multaj gazetoj estis akurata antaŭ 75 jaroj aranĝita en la urbeto VERMANŮV MĚSTEC en orienta Bohemio dum tagoj de 26-a gis 28-a de aŭgusto de 1911-a jaro en la kadro de =JUBILEA METIA-INDUSTRIA EKSPOZICIO= "IV. Kongreso de Orientbohemiaj esperantistoj", kunligita ku ekskurso en regionon de FERAJ MONTJOJ. Kongreson organizis instruisto s-ano KUDRNA el distrikta urbo CHRUDIM. En la programo de la kongreso estis preparita ankaŭ ĉeĥa-esperanta akademio en bildejo, kie estis ekspozicio de ESPERANTO-materialo. Kiel partoprenanto de la kongreso devis esti inter aliaj esperantistoj ankaŭ esperantiasta poeto D-ro SCHULHOF. Dum akademio prelegis pri ESPERANTO s-ano instruisto KUDRNA, esperante recitis s-ino ROZMARINKOVÁ, ambaŭ el CHRU-

DIM, pri esperanta literaturo parolis f-ino MELICHAROVÁ el HRADEC KRÁLOVÉ, plie D-ro FOUSEK, instruisto ŠUKAL, prof-o NEUDÖRFEL, s-roj VESELY, BERAN, prof-o RÜŽIČKA, f-inoj MELICHAROVÁ, GOLDSMÍDOVÁ, kantis teatra artisto, kantisto TLUČHOŘ. Inter diversspaca ESPERANTO-materialo estis ankaŭ letero de DR-o L.L. Zamenhof. Esperantistoj el FERAJ MONTOJ tre volonte kompletigus ĉion pri tŭu IV. KONGRESO, tiel ili petas ĉiujn esperantistojn, kiuj eĉ iun, eĉ malgrandan sciigon pri tiu kongreso havus, ke ili afable informu s-anojn František kaj Rudolf PLESKOT el HERMANŪV MĚSTEC, Šimonkova 567, 538 03 Ĉeĥoslovakio. Antaŭdankon!!!



33-jara diplomita flegisto volas korespondi kun esperantistino el Ĉeĥoslovakio. Liaj interesoj: medicino, precipe psikiatrio kaj neurologio. Li satas danci, promeni en la naturo kaj ĝui la silenton en la naturo, vojaĝi per automobilo, iri al kinejo, legi interesajn librojn, naĝi, li satas la sunon. Lia adreso: Eugen KUFZ, Fachklinik "Fürstenhof" 3590 Bad Wildungen, B.R.D.

ESPERANTO-rondeto KOLÍN adiaŭis kun sia diligenta, longjara komplezema ano, Jaroslav S T A N Ě K, kiu forpasis 78 jarojn aĝa la 27-an de aŭgusto 1986. Honoron al lia memoro!

Ni senkulpigas nin al niaj legantoj, ke per misatento estis ŝanĝitaj la paĝoj 7 kaj 10 en STARTO 4/86. Ni dankas al vi por via kompreno.

Redakcio de STARTO

STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská str. 10, CS-110 01 PRAGO 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6-foje jare. Redakta komitato: Jiří Hanousek (grafika arango), Jaroslav Kašparec, Miroslav Malovec, Jiří Patera (responda redaktoro) kaj Helena Štruncová. Presas RUCH Liberec. Transdonita al la presejo la 15-an de novembro 1986. Jarabono 24 CSK, por eksterlande 36 CSK aŭ 10,50 NLG, inkluzive de sendkosto. Abonantoj turnigu la niaj perantoj, al UEA aŭ rekte al nia asocio.

STARTO - nepravidelný věstník Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 01 PRAHA 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Redakční rada: Jiří Hanousek (grafická úprava), Jaroslav Kašparec, Miroslav Malovec, Jiří Patera (odpovědný redaktor) a Helena Štruncová. Povoleno odborem kultury NVP č. 310008385 ze dne 18.3.1985. Tiskne RUCH Liberec. Předáno do tisku 15.11.1986. Dohledací pošta Praha 07. Snížený poplatek za poštovní povolen Ředitelstvem pošt Praha pod č.j. P/1-1267 ze dne 6. 4. 1979.

Výtvarná řemesla

Praha

Vám nabízejí široký
sortiment bytových
doplňků a dárkových
a upomínkových
předmětů,
vyráběných převážně
v malých sériích
s častou inovací.

NABÍZÍME:

**SOUSTRUŽENÉ MOCCA SOUPRAVY
SOUSTRUŽENÉ ODKLÁDACÍ STÓLKY
MALOVANÉ PORCELÁNOVÉ SOUPRAVY
I JEDNOTLIVÉ KUSY
MALOVANÉ A BROUŠENÉ VÁZY, MÍŠY
A POPELNÍKY
VÝROBKY Z CÍNU**

**BIŽUTERIE KOVOVOU A KOŽENOU
A DALŠÍ SORTIMENT Z KOVU, KŮŽE,
KOŽENKY A TEXTILU**

Adresy prodejen upomínkových a dárkových předmětů:

110 00 Praha 1, Národní tř. 37	22 41 94
110 00 Praha 1, Vodičkova 28	24 47 71
110 00 Praha 1, Spálená 39	29 27 04
110 00 Praha 1, Na poříčí 35	23 17 315
110 00 Praha 1, Křížovnické nám. 2	26 63 28
120 00 Praha 2, Anglická 18	25 98 56
110 00 Praha 1, Lazarská 5	29 83 22
110 00 Praha 1, Železná 12	22 79 14
170 00 Praha 7, Obránců míru 17	37 44 84
110 00 Praha 1, Můstek – stanice metra	26 14 19
360 00 Karlovy Vary, Mariánská 2	930/28 381

Vzorkovna nábytku:

110 00 Praha 1, Václavské nám. 41 26 40 64

přijímá objednávky na individuální zakázky
nábytku a bytových doplňků.

**V našich prodejnách
naleznete
vhodné dárky
pro každou příležitost.
Naše pracovnice Vás
ochotně obslouží
a pomohou vybrat
předmět,
který potěší.**

**Český esperantský svaz
110 01 PRAHA 1, Jilská 10**

NOVINY

Dohlédací pošta Praha 07

Snížený poštovní poplatek povolen

Ředitelstvím pošt Praha

J. ZN. P/1-1267/79 ze dne 6. 4. 1979